nia voĉo

**madrida esperanto-liceo marto 2013**

## ALPROKSIMIĜAS LA IBERIA RENKONTIĜO

La Iberia Renkontiĝo okazos dum tiu ĉi monato marto. Restas do tre malmultaj tagoj por aliĝi kaj rezervi. Memoru ke temas pri la ĉiujara renkonto de junuloj de la iberia duoninsulo, kvankam ĝi estas malferma al ĉiuaĝaj esperantistoj de la tuta mondo. Ĝi disvolviĝos ĉijare en Madrid, en la junulargastejo San Fermín, inter la 15a kaj 17a de marto. Oni ankaŭ pretigos programerojn por la ekstera publiko, inter kiuj prelego pri Esperanto kaj fulma kurso.




La baza kotizo estas 20 eŭroj. Ankaŭ eblas loĝado en la gastejo, kun prezo de 60 eŭroj, sed atentu ke tion oni devas anonci jam, por certi pri vakaj lokoj. Oni devas ĝiri la monon al bankokonto 2103 0471 91 0030005725.

En pasinta numero de nia bulteno oni povas konsulti la programon. Memoru ke sabate nokte oni organizos gviditan viziton sekvantan la paŝojn de la literatura rolulo Max Estrella de *"Lumoj de Bohemio"* de Valle-Inclán. Dimanĉe matene okazos biciklo-promeno tra *Madrid Río*.

Ĉiuj necesaj informoj pri la renkonto aperas jam en la retejo http://esperanto.es:8080/IberiaRenkontigho/. Eblas kontakti kun la organizantoj ĉe la adreso: IRoMadrido2013@gmail.com. Al vizitontoj de la evento, utilos la legado de ampleksega vikipedia paĝo pri Madrido, ĉe: http://eo.wikipedia.org/wiki/Madrido.

## VENONTAJ KONGRESOJ

Progresas la pretigado de la 86a kongreso de SAT, okazonta de 28a de julio ĝis 4a de aŭgusto 2013 en Madrido, nome ĉe Colegio Mayor San Juan Evangelista. Do, denove en Hispanio post 11 jaroj kaj unuafoje en Madrido.

Kiel kutime ĉe SAT-kongresoj, matene okazos kunsidoj, malfermaj al ĉiuj kongresanoj, kaj posttagmeze, kaj foje vespere, organiziĝos klerigaj programeroj kaj socipolitikaj debatoj. Vespere ĉefe okazos la distraj programeroj: koncertoj, teatraĵoj ktp.

Oni pretigas tuttagan ekskurson al Toledo kaj duontagajn promenadojn tra Madrido serĉante ne nur la turismajn konindaĵojn sed ĉefe la lokojn kiuj estas ligataj al la historio kaj socipolitika vivo de la urbo kaj de la lando. Postkongreso okazos, se estos sufiĉe da interesatoj, el la 5a al la 8a de aŭgusto kun vizitoj al najbaraj urboj.

Oni povos trovi pli ampleksan kaj detalan informaron pri la kongreso en la oficiala retejo http://satesperanto.org/-2013-86-madrido-.html




Bonorde marŝas la pretigado de la 72-a Hispana Kongreso, kiu okazos en Zaragozo inter la 3-a kaj 5-a de majo. Riĉiĝas la kultura kaj distra programo. Al la konfirmita ĉeesto de la tuluza kantisto JoMo, pri kiu ni informis en pasinta *Nia Voĉo*, oni povas aldoni la partoprenon de la malaga Solo. Ankaŭ konfirmiĝas la ĉeesto de diversaj aŭtoroj de la Ibera Skolo, kaj la prezento de venontaj eldonoj.

La tuta provizora programo troviĝas en https://sites.google.com/site/zaragozafrateco/2013-hek/

La estraro de HEF faris alvokon por peti kandidatiĝon por venonta Hispana Kongreso de Esperanto, en 2014. Jam alvenis kelkaj sugestoj kaj sinproponoj, kaj do oni petis ĉiujn interesitajn grupojn, prezenti sian kandidatiĝon, prefere antaŭ la 17-a de marto, kiam oni komencos studi la proponojn. La finan decidon oni prenos dum la Kongreso en Zaragozo. Ju pli kompleta la propono, des pliajn ŝancojn ĝi havos. Ne hezitu do jam esplori lokojn, datojn, kaj eĉ proponon pri programeroj.

## OLIVA KLUBO

Antaŭ kelkaj monatoj fondiĝis en la valencia urbeto Oliva, grupo de Esperanto formita de pluraj tre junaj aktivuloj. Dum venontaj tagoj, Madrida Esperanto-Liceo donacos al la grupo faskon de libroj, kiel apogo al la disvolvo de la grupo. La Oliva Klubo organizos inter la 21-a kaj 23-a de junio Valencian Esperanto-Renkontiĝon. Detalojn eblas legi en http://esperantoval.com/.

## VIZITOS NIN

La lundon 4-an de marto venos Madridon la prezidanto de Germana Esperanto-Asocio, Rudolf Josef Fischer. Li vojaĝas kun la edzino kaj amikoj en Hispanio, kaj antaŭe vizitos kelkajn andaluziajn urbojn.

Li intencas partopreni la lundan kunvenon en la sidejo de MEL, kie li povos rakonti siajn spertojn en Hispanio, kiun li vizitis plurfoje, ĉefe laŭlonge de la Jakoba Vojo, kaj ankaŭ sian esperantan sperton. Pro kalendaraj kialoj oni ne povas komplete certigi tiun ĉeeston, sed en tiu kazo, oni provos fiksi kunvenon marde la 5-an.

## LIBRO DE LA KOMPLUTA UNIVERSITATO

Jam troviĝas en la biblioteko de HEF ekzemplero de la libro per kiu la madrida universitato UCM (*Universidad Complutense de Madrid*) priomaĝis la verkiston José Luis Sampedro.

Ĝi konsistas el eldono de du poemoj kaj unu prozaĵo verkitaj de la aŭtoro, kun traduko en pli ol kvardek lingvojn. Oni petis al HEF kontribui per esperantigo de la tekstoj, kaj pri tiu laboro zorgis Miguel Fernández, per la traduko de la versa parto, kaj Antonio Valén pri la proza. La rezulto aperis libro-forme sub la titolo *José Luis Sampedro en mil y una lenguas* (José Luis Sampedro en mil kaj unu lingvoj).

## FORPASIS MARITZA GRAZIANI

Nia samideanino Maritza Graziani, forpasis pro kancero la 26-an de februaro. Ŝi devenis el Venezuelo kie ŝi lernis Esperanton kaj tie aktivis, kaj de pli ol 20 jaroj loĝis en nia regiono. Niaj kondolencoj al nia amiko Fernando Moral.

## VENONTAJ RENKONTOJ

La oficialaj kunvenoj de MEL plu okazas ĉiulunde je 18.30, en la sidejo de la strato Rodríguez San Pedro, 13, 3º.

La ĉimonata sabata babilrondo okazos la 2-an de marto, kiel kutime en la VIP'S de la "Kuboplaco", je la 17.30.

Novaĵoj kaj detaloj aperas en retlisto http://es.groups.yahoo.com/group/esperanto_madride/, en retejo http://www.esperanto.es/mel.

Memoru ke se vi ankoraŭ ne membras en Madrida Esperanto-Liceo, aŭ se vi deziras realiĝi, vi povas skribi al madrid@esperanto.es aŭ ĉeesti niajn ĉiusemajnajn kunvenojn.